

ESPERANTO

INTERNACIA REVUO ESPERANTISTA

N-ro 529

NOVEMBRO 1949

Ofta demando estas :

Ĉu ekzistas Esperanta literaturo ?

En la 21 jaroj de sia ekzisto

THE ESPERANTO PUBLISHING COMPANY LTD.

eldonis

230,000 librojn

konsistantajn el 76 verkoj.

E.P.C. ĉiam estas je via servo. E.P.C. vendas nur pogrande, sed ne pomalgrande.

Sekve mendu ĝiajn eldonaĵojn ĉe via enlanda libroservo aŭ ĉe

UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO

Heronsgate, Rickmansworth, Herts., Anglujo

E.P.C.-librolisto troviĝas en la dua parto de la jarlibro 1949

ANONCETOJ

Kosto : du pencoj por ĉiu vorto, aŭ internacia respondkupono por ĉiu duo da vortoj.

Ĉiu anoncanto morale devigas sin respondi minimume unu fojon al ĉiu kiu skribas.

Tutmonda Katolika Adresaro Esperantista, 1950— Kvina jaro. Enskribo de nomo, adreso, aĝo, telefono, koresponddeziroj—du internaciajn respondkuponojn (kun senpaga ekzemplero). Limdato: 15 Decembro. Aperos Januaro 1950. Lorcán OhUiginn, Bóthar Glasárd 16, Dublin, Irlando. 1949a eldono ankoraŭ havebla.

Nudul(in)oj, duonnudul(in)oj sur poŝtmarkoj! Legu jarlibron 1949, paĝ. 13.

Deziras korespondi kaj interŝanĝi tajlordesegnaĵojn kun la tuta mondo Dragutin Orlović, Sutjeska 9, Mitrovica Srem, Jugoslavujo.

21-jara studento deziras korespondadi tutmonde. Wiesław Gallus, ul. Partyzancka 124, Pabianice, Pollando.

La sekcio de L.E.E.N. en Hoogezand aranĝos en la monato Decembro letervesperon. Geesperantistoj ĉiulandaj sendu leterojn, poŝtkartojn ilustritajn, k.t.p. al la sekretario S-ro M. Abbas, B.C.straat, 60, Sappemeer, Nederlando. Respondo garantiata.

Zamenhofan Tagon okazos nia unua ekspozicio kaj ni petas helpon por plensukcesigi ĝin. Bonvole sendu poŝtkartojn, bildojn, broŝurojn, nacikostumajn bildojn, k.t.p. Nepre dankos Esperanto-Grupo, Swarthmore Institute, Plymouth, Anglujo.

“Stelo” poŝtmarka paketo (100 diversaj hungaraj poŝtmarkoj) kontraŭ 3, Esperanto-Poŝtmarko de Aŭstrujo aŭ Bulgarujo, aŭ memorpoŝtmarko de Festivalo en Budapeŝto (Renkontiĝo de Tutmonda Junularo) sur analogkarto, kontraŭ 2 respondkuponoj, afrankite, ĉe Esperanto Kultur-Servo, Jolsva u. 4, Budapeŝto III, Hungarujo.

Vartistino katolika, diplomita, france, angle, serĉas deĵoron en Kanado. Tallon, Minderbroederstraat 48, Louvain, Belgujo.

Mi serĉas filatelajn geamikojn en la tuta mondo. Nepre respondos! Bonvolu afranki filatele. Manfred Hagemann, dekok-jara, Galgenbergstrasse 10—I, (20a) Hildesheim, Brita Zono, Germanujo. Kiu povas havigi al mi la gazeton “Esperanto” de Januaro 1949? (elĉerpita ĉe UEA).

Deziras ricevi seriojn de jubileaj poŝtmarkoj neuzitaj kontraŭ persaj poŝtmarkoj Habib Taherzaden, c/o A.I.O.C. Ltd., (Accounts Dept.), Tehran, Iran.

Atentu! Mi serĉas la tutmondon por ekspoziciaj materialoj esperantaj. Bonvolu sendi al mi ion: poŝtkartojn, leterojn, librojn, broŝurojn, afiŝojn, flugfoliojn, k.t.p. Horst Patte, (20b) Altenaŭ, Oberhartz Silberhütte, British Zone, Germanujo. Mi nepre respondos.

Okaze de prelegvojaĝo tra Svedujo mi petas miajn geamikojn noti mian adreson dum la tuta vintro. Volonte mi akceptos ankaŭ proponojn pri prelegvojaĝo en aliaj landoj. Tadros Megalli, ĉe Sveda Esperanto-Federacio, Tegelbacken, Stockholm.

Filatelistoj! John Prime, High Street, Swavesey, Cambridge, Anglujo, havas milojn da poŝtmarkoj por interŝanĝi kun vi.

Laboro. Mi deziras Esperantistinon kiu volas labori en gastdomo dum 1950. S-ro Collier, Green Star Gastdomo, 7 Ethelbert Terrace, Westgate-on-Sea, Kent, Anglujo.

Letervesperon aranĝos novaj gelernantoj 16–30-jaraj 6 Dec. 1949. Bonvole sendu poŝtkartojn al Kansalaisopisto, KUOPIO, Finnlando.

Interŝanĝas poŝtkartojn kaj leterojn tutmonde, nepre respondas: S-ro John Håkansson, Roten M.12, Mölndal, Svedujo.

S-ro Sigvard Håkansson, Wenströmsvägen 10, Hjorthagen, Stockholm, Svedujo, deziras korespondi poŝtkarte kaj letere pri ĉiuj temoj kun ĉiuj mondpartoj. Komprenas ankaŭ france, angle kaj germane.

Letervesperon aranĝos la 28an de novembro Esperantistoj en Tampere. Nepre respondos. Skribu al la sekretario: Letervespero, Pentti Laitila, Vuolteenk. 22 C 6, Tampere, Finnlando.

S-ino Irja Halme, Piengkodit N-ro 3, Messukylä, Finnlando, deziras interŝanĝi poŝtkartojn kaj leterojn kun la tuta mondo.

F. Giménez, c. Londres 94. 1. 3, Barcelona, Hispanujo, deziras interŝanĝi poŝtmarkojn de ĉiuj landoj laŭ kvanto.

Serĉataj estas novaĵoj pri samideano Windisch-Sartowsky, muzika komponisto el Berlin, fuĝinta kun edzino dum Nazi-regado al Italujo; plie pri pola samideano Vogelfang, kiun helpis foriri el Praha al Svedlando la aŭstraliaj Esperantistoj Hanks. Utilajn informojn sendu al O. Ginz, Stárkova 4, Praha II, Ĉeĥoslovakujo.

Juna aŭstralia lernanto deziras korespondi kun junaj Esperantistoj en aliaj landoj. Arthur G. Byrnes, 43 Omara Street, Mayfield, Newcastle, Aŭstralio.

Pri marionetoj deziras korespondi Jorge Hess, Tupac-Amaru 1132, Buenos Aires, Argentino.

Patrino kaj filino (20-jara) serĉas korespondadon en la tuta mondo. Nepre respondos. Eleonore kaj Helga Schurmann, Burgstr. 1, Gevelsberg, Westfalen, Germanujo.

25 novaj norvegaj gesamideanoj deziras ricevi kartojn kaj leterojn el la tuta mondo por letervespero la 20-11-49. Kuraĝigu ilin tuj skribante multnombre al: “Mara Vento”, Boks 132, Haugesund, Norvegujo. Certe respondos.

Gelernantoj, deziras ricevi bildkartojn, turistajn prospektojn, k.t.p. Sendu ilin al S-ro Josef Steppan, Rudolstädter str. 1, (15a) Kahla/Thur., Soveta Zono, Germanujo, kiu ankaŭ deziras korespondi kun instruistoj pri pedagogiaj temoj.

GRAVA PREZMALALTIGO

por la jenaj svedaj libroj

La Granda Aventuro	-	- F. Szilagyi
Mi serĉis oron kaj oleon	-	- D. Flood
Printempo de Morto	-	- Zilahy
Vivo Vokas	-	- Stellan Engholm

Ĉiu volumo nun 8ŝ. bind., afranko 6p.

Mendu ĉe

UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO
Heronsgate, Rickmansworth, Anglujo

ESPERANTO

INTERNACIA REVUO ESPERANTISTA

42a JARO Novembro 1949

N-ro 529 (II)

Oficiala organo de
Universala Esperanto-Asocio

Fondinto : H. HODLER

Redaktoro :
HANS JAKOB

Helpredaktoro
MASON STUTTARD

Ĉion por la redakcio sendu al
ESPERANTO

Palais Wilson, Genève, Svis.

Traduko kaj represo de artikoloj
estas permesataj, kondiĉe ke oni
citu la fonton. Por bibliografia
celo oni sendu periodaĵon en kiu
aperas represo el ESPERANTO,
al nia redakcio.

Ĉion pri administrado de UEA
kaj de la revuo ESPERANTO,
abonado, reklamoj, anoncetoj
sendu al

UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO
Heronsgate, Rickmansworth
Herts., Anglujo

Jara abono : 8 ŝil. anglaj
(kun membreco kaj jarlibro
12ŝ. 6p.)

Ĉefdelegitoj kaj Perantoj en
multaj landoj

Tarifo por reklamoj :

1 paĝo £5 : ½ paĝo 50 ŝil.
¼ paĝo 25 ŝil. : ¼ paĝo 12.5 ŝil.

Anoncetoj pri korespondado :

2 pencoj por unu vorto aŭ
1 int. respondkupono por ĉiu
duo da vortoj

Legantoj en 65 landoj

PENADO KAJ REZULTO

De tempo al tempo oni sin demandas, ĉu ni efektive progresas kaj ĉu la rezulto konformas al la penado, ĉu la rezultoj kontentigas la aktivulojn. La respondo al tia demando malsamas laŭ la temperamentoj. Pesimismulo dirus, ke malgraŭ la grandioza laborado plenumita en la propagando, instruado, praktika uzado de la lingvo, malgraŭ multaj oficialaj rekonoj k.s. Esperanto eĉ ne estas ĉie konata, ke la klopodado ĉe internaciaj oficialaj instancoj ne donis konkretan rezulton, ke nia movado ialoke stagnas kaj ankoraŭ pli longa listo de veraj konstatoj estas malĝuste interpretitaj. Lia kontraŭulo estas la optimismulo, la homo kiu vidas ĉion rozkolora, kiu daŭre fanfaronas pri la kolosa afero, kia estas Esperanto, kiom brilaj sukcesoj jam estas atingitaj kaj similaj diroj. Kiu do estas ĝusta el la du profetoj? Objektiva prijuĝo konstatas, ke ambaŭ citas *parton* de la vero, eron de la efektiva situacio. Kiam D-ro Zamenhof eldonis sian unuan lernolibron, la faman *Unua Libro* de Esperanto, li aldonis folieton kiu enhavis deklaron farotan de la aĉetanto. Laŭ ĝi, la aĉetanto de la broŝuro promesas ellerni Esperanton se dek milionoj faros la saman promeson! Same kiel Zamenhof kredis je bonsenco de la homoj, ankaŭ ni mem kredis kaj ankoraŭ kredas je **deklaroj**, la bonintencaj **rezolucioj**, ĝentilaj **komplimentoj**, taŭgaj por la momento, sed neniel influantaj la progreson. La sekreto de sukceso estas en nia daŭra laborado, en nia propra sinteno kaj en nia firma konvinko, labori por ideo, kiu iagrade kunhelpas al la progreso de humanecaj celadoj.

Serĉante klarigi al ni la malrapidan progreson de nia ideo, ni rigardu iom aliajn movadojn universalajn. Oni ne miskomprenu min, se mi citas ĉi-loke la kristanismon, kiu ĝis ĝenerala akcepto oficiala bezonis kvar jarcentojn! La socialismo, amasmovado en la vera senco de la vorto, post jarcento da klopodo staras ankoraŭ en defenda pozicio.

Oni povus citi ankoraŭ aron da internaciaj movadoj, disponantaj pri rimedoj multe pli grandaj kaj havantaj por si aliajn premisojn. Ili same estas militantaj, penadas same kiel ni por esti ĝenerale rekonataj.

Konkludo: Esperanto kiel infano de la liberalisma epoko grave suferis pro la ŝanĝo de la tempo. Facile videblaj estis la rektaj sekvoj de la du militoj. Tamen faktoro tre grava por nia movado estas la malapero de la mezaj klasoj, fakto jam sentita post la unua mondmilito. Kaj la pli grava faktoro estas la forigo de la gvida pozicio de Eŭropo en ĉiuj rilatoj. Malgraŭ ĉio, tiu kontinento restas nia ĉefa kampo de agado; kaj ĉio kio povos redoni al Eŭropo ĝian gravecon trovas nian varman aprobon. Konante la veran situacion, ni konsciiĝu kelkajn faktojn: Esperanto restariĝis, ĝi neniam malaperos kiel kultura celado, ĝi utilas jam nun! De vi ĉiuj dependas regula kaj konstanta progreso. Ni iru la mezan vojon, ni vidu la realaĵojn de la vivo, kaj ĉefe: Ni laboru!

H.J.

DU JUBILEOJ

Ernfrid Malmgren 50-jara

La postmilita generacio de Esperantistoj konas sufiĉe bone la kvalitojn kaj ŝatindan personecon de la prezidanto de U.E.A. kaj ne bezonas ian priskribon. Okaze de la 50-jara (3-an Nov.) jubileo tamen valoras reiri en la karieron de nia ŝatata samideano kiu staras kiel piloto ĉe la gvidilo de nia ŝipo, por konigi la bazojn de tiu prudenta karaktero.

Jam en 1915-17 kiam li vizitis komercan gimnazion, E. Malmgren ekinteresiĝis pri Esperanto, sed la premo de aliaj temoj malhelpis al li doni tempon al tiu flanka afero. La studado en la komerca instituto donis al li praktikajn konojn de organizado kaj reklamado, kiuj poste pruviĝis valoraj. Post kelkaj jaroj kiel oficisto, li ŝanĝis sian metion kaj vizitadis instruistan seminarion, kie li akiris pedagogiajn kompetentojn kaj intereson pri psikologiaj faktoroj.



Tiel ekipite, li komencis aktivan laboron por Esperanto en 1928 kaj en tiu jaro en kunlaboro kun Rektoro Sam Jansson grandskale organizis kursojn por Andreo Cseh. Li samtempe iniciatis la t.n. Esperantan Turistan Komisionon, kiun li gvidis ĝis 1939. Tiu Komisiono siatempe estis tre vigla turisma asocio, kiu veturigis milojn da svedoj al Estonujo, Sovetunio, Finnlando kaj al la Universalaj Kongresoj. Kiel Sekretario de Sveda Esperanto-Federacio de 1930 ĝis 1940 li interalie organizis plurajn prelegvojaĝojn tra tuta Svedlando, ekz. por L. Sinha, Hadzi Mustapha, J. Scherer kaj aliaj. En 1934 S-ro Malmgren estis ĉefa organizanto de la bela kaj pompa U.K. en Stockholm. Li estis tiam elektita estrarano de U.E.A. kaj en 1937 fariĝis vicprezidanto de I.E.L. Li fariĝis Prezidanto de U.E.A. en 1947.

Kiel instruisto li deĵoris konstante en Stockholm kaj dum kelkaj jaroj estis prezidanto de la tiea ĝeinstruistaro. De 1948 li estas kasisto de S.I.F. kaj ekonomia ĉefo de ĝia ĉiusemajna organo.

Li verkis lernolibrojn por lernejinfanoj pri la sveda socia strukturo kaj pri librotenado. Por la sveda movado li verkis i.a. la lernolibron *Sistema Kurso* (kunlabore kun Henrik Seppik) kaj korespondan kurson. Krom tiuj praktikaj aferoj, li ankaŭ kompilis *Sveda Kantareto*, kolekton da svedaj popolkantoj en Esperanta vesto, plejparte tradukitaj de li mem. Flankintereso lia estas artpentrado kaj unu lia revo estas kolekti akvarelojn el diversaj partoj de la mondo.


Lian laboron en la kadro de U.E.A. karakterizas la praktika, organiza talento, kiu estas lia elstara trajto. Li ŝatas sisteman persistan laboron kaj konstante favoras la sisteman unuecan agadon ĉe la registaroj kaj oficialaj instancoj por plifortigi la pozicion de Esperanto. Lia plej arda deziro estas, ke inter la Esperantistoj konstante regu harmonia kunlaboro, subtenata de respekto reciproka, ke la samideanaro dediĉu sin al la progresigo de sia afero kaj al la forigo de la indiferento de la publiko.

Simbolo de la harmonio reganta en la organizaĵo mem, kaj verŝajne unu el la bazoj de tiu sento de intima amikeco, kiu ekzistas inter la prezidanto kaj la Centra Oficejo estas la jena rakonto, raportita de Komitatano E. Adamson en la sveda gazeto *La Paco*: "... Kiam Generalo Bastien en Francujo, pro la germana okupado ne povis aktive funkcii kiel prezidanto, Malmgren estis lia anstataŭanto kaj konservis la kontakton inter la C.O. en Londono kaj la Esperantistoj en la kontinento Eŭropo. Malmgren eldonis bultenon, kiu estis dissendata al la Esperantistoj tra tuta Eŭropo. Laŭ ricevita sciigo, tiu bulteno estis kvazaŭ lumstrio al niaj amikoj en malluma tempo. Kaj kiam dum multaj jaroj estis neeble sendi poŝtaĵojn senpere de Svedlando al Anglujo, Malmgren sendis siajn leterojn al la delegito en Portugalujo (S-ro S. Carreira), kiu plusendis la leterojn al Londono; sed kelkfoje li devis unue sendi siajn leterojn al Nov-Jorko (S-ro A. Connor), kiu transsendis ilin al Londono. Kun Francujo la kontakto estis konservata pere de Alĝerio. Dum certa tempo la leteroj estis transportataj kiel "familiaj" aŭ "parencaj" leteroj, kaj tiam la Sekretario de la organizo fariĝis "Kara Onklo Cecil" kaj Malmgren "Kara Kuzo Ernfrid" k.s. La asocio do fariĝis "familia entrepreno"!

Kvankam malfrue, ni esprimas al nia prezidanto la plej sincerajn bondezirojn de nia membraro kaj certe de la tuta samideanaro, kun la espero, ke li longe vivos por la bono de nia afero.

Cecil Charles Goldsmith, 60-jara

Verŝajne la plej konata figuro en la nuntempa Esperanta mondo estas la malgrandstatura sed dinamika sekretario de U.E.A. Naskita 16-an de novembro 1889 en Gloucester, Anglujo, li ricevis sian edukon en la teknika lernejo, kaj poste en la universitato de Birmingham. Li fariĝis Esperantisto en 1907 kaj en la fruaj jaroj aktivis en kaj ĉirkaŭ Birmingham. Li dum pluraj jaroj sekretariis ĉe la Mezlanda Federacio. Fariĝinte oficiro en la brita armeo, li grave vundiĝis en Francujo kaj dum tre longa tempo suferis de la postefikoj. En tiu periodo li spertis la praktikan kaj moralan valoron de Esperanto, loĝante kun sia familio konvalesce en Germanujo ĉe samideanoj.



En la jaro 1926 kiam la brita asocio frontis al krizo financa kaj organiza C. C. Goldsmith surprenis sur sin la taskon gvidi ĝin el ĝiaj embarasoj. Li havis iom da sukceso en tio, kaj liaj administraj kapabloj estis tiaj, ke kiam subite mortis Robert Kreuz en 1936, la evidenta elekto de nova direktoro de U.E.A. estis Goldsmith. Kelkaj monatoj—dum li aranĝis aferojn ĉe B.E.A.—intervenis antaŭ ol li efektive prenis la administradon de la internacia neŭtrala movado. La resto estas konata historio. Sufiĉas diri, ke de tiu tempo li kompetente kaj diligente administras nian internacian organizaĵon kaj

gajnis la estimon de la samideanaro tra la tuta mondo. Sufiĉas memori la aklamon, kiu lin salutas en la ĉiujara festo de la Esperantistaro, por scii la lokon, kiun C. C. Goldsmith okupas en la koroj de la samideanaro.

Mi certe eĥas la deziron de la tuta membraro kiam mi salutas nian multjaran laboranton okaze de lia jubileo kaj esprimas al li la esperon, ke li vivu feliĉe kaj longe kaj fartu bone.

M.S.

La antaŭkongreso en Londono

(Ni bedaŭras, ke la jena raporto ne povis aperi pli frue, sed ni mem ricevis ĝin nur en tempo, kiam la novembra numero estis presata.—Red.)

Dum longa sinsekvo da jaroj la gesamideanoj bone rimarkis, ke la Esperanto-klubo en Londono majstre plenumis siajn taskojn. Pro tio oni kun ĝojo notis, ke la Londona Esperanto-Klubo ĉi-jare invitis al kongreseto antaŭ la 34-a U.K. en Bournemouth.

Oni ne seniluziiĝis. Jam de la momento, kiam la energia kaj talenta antaŭkongresa sekretario J. W. Leslie ŝerce salutis la geĉeestantojn per la vortoj “Karaj gekorespondantoj!” oni sentis la amikan kaj hejmecan atmosferon, kiun havis ĉiuj aranĝoj. Aparte impona estis la grandega kongresejo (Royal Hotel) kiu kun siaj 777 litoj similis al vera urbeto. Ni dankas la komitaton, kiu sukcesis aranĝi tiun pompan ejon, kie preskaŭ ĉiuj loĝis, mangis, babilis k.t.p. Tiun kongresejon oni neniam forgesos.

Rimarkinda afero ĉe la malferma kunsido estis la televidado Esperanta. Kiam la bonkora prezidanto H. W. Holmes forlasis la salonon kune kun, inter aliaj, Sinjorino Wanda Zamenhof, oni sentis ion neordinaran, kaj kiam ili poste salutis nin en la speciale akiritaj aparatoj en la hotela ĉambrego, la aplaŭdo bruis.

La ekskursoj estis tre multenombraj. La bela eleganta kongreslibro menciis eĉ preskaŭ 40 diversajn. Ĉiu kongresano havis eblon elekti laŭ siaj gusto kaj deziro. Ili tutsimple travivis la grandurbon en tre facila maniero, sed multaj anoj asertis, ke la ŝipekskurso en la haveno estis la vera travivaĵo por la “kontinentanoj”.

La balo estis bonege aranĝita kaj donis distrajn eblojn ankaŭ al nedancantoj. Kun vera ĝojo oni ĉeestis la Verdian Kabaredon dum kiu Ken Alexander kaj la lertaj Londonklubanoj montris, ke ili estas kapablaj aranĝi kion ajn. Lerta kaj bonhumora prezentado en ĉiuspecaj detaloj, kiuj vekis la admiron de la dankema publiko.

La Londona antaŭkongreso estis la apetitekscita ilo antaŭ la 34-a U.K. Ke ĝi bonege plenumis tiun taskon ni ĉiuj sentis. Koran dankon pro la travivaĵo.

J.S.

ESPERANTISMAJ PROBLEMOJ

VIII.—La Administrado

Ideo celanta socian plibonigon kutime trairas la jenajn ŝtupojn de evoluo: genezon de la ideo, ĝian formuligon, varbadon de la unuaj defendantoj (apostoloj, pioniroj) disajn grupojn de sam-ideanoj, kunigon de grupoj en firman organizaĵon kun ia centro. La lasta stadio do estas de efektiva movado; kaj en tiu momento, la ĝistama laborado honorofica, sensalajra, renkontas baron, venkeblan nek per bonvolo superhoma, nek per organizaj metodoj. Alivorte, necesas krei tion, kion oni vulgare nomas *burokratismo*, t.e. administrado. Pri tio regas en nia movado tre malklaraj perceptoj pri etendiĝo, povo kaj ebloj. Prilumi ĉi tiun problemon el diversaj star- kaj vid-punktoj celas la nunaj linioj.

Por tuj precizigi: temas pri empirie fiksitaj konkludoj, t.e. pri spertoj akiritaj dum pli ol kvardek jaroj, ĉu en nia, ĉu en aliaj movadoj, similaj al la nia.

La komenco de U.E.A. kaj la funkciado de la ĉefaj servoj sin bazis sur la ideo, ke oni povus sekcii aŭ distranĉi la plenumotan laboron, transdoni la erojn laŭ fakoj al dise loĝantaj personoj, sensalajre laborantaj, kaj doni al la centro nur la pure mekanikan laboron (financojn, enkasigon, kontrolon de la membroj, korespondadon pri tiuj teknikaj detaloj). Rapide evidentiĝis, ke tio kreas konfuzon konstantan inter la diversaj sekcioj. Montriĝis frue, ke la mortpezo de la movado estas la prizorgo pri la diversaj teknikaj detaloj supre montritaj. Evidentiĝis ankaŭ alia tre grava konstato, nome, ke la kostojn por tiu grava parto de movado oni ne povas alkalkuli entute je la kotizoj. Rezultas el tio, ke la administrantoj (sekretarioj, oficistoj) devas doni sian maksimumon, ke certajn aferojn oni neniam povas prilabori tiom profunde, kiom oni volus, kaj ke certaj iniciatoj restas morta litero.

La administrado de asocio sen komerca celo (ekz. fabrikado kaj vendo de artiklo) estas, laŭ financa vidpunkto, neta perdo. Por egaligi tiun perdon, spertitan ne nur en la Esperanto-movado, sed ankaŭ en aliaj nekomercaj entreprenoj, necesas aŭ relative alta kotizo aŭ iaj mondonaj servoj, nepostulantaj gravan kromkoston por la administrado. U.E.A. tion provis kun momenta sukceso. Eksteraj cirkonstancoj, precipe monaj, haltigis tiun provon promesplenan. Por ŝtopi la truon en la bilanco, kaŭzitan per la ĉiujare revenanta perdo, ekzistis la ĝojiga fakto, ke ne malmultaj samideanoj donis konsiderindajn sumojn aŭ laboris kvazaŭ profesie sed sensalajre

por la afero. Nu ĉio tio ne estas kalkulebla antaŭe. Tio estas hazarda bonŝanco.

Atenta leganto de la bilancoj de U.E.A. konstatas, ke la kosto de la administrado (do nur la salajroj de la oficistoj) formas trionon de la elspezoj. Tiam proporcion ni trovas ĉe aliaj internaciaj organizaĵoj, kaj sekve oni rajtas diri, ke tio estas normala.

Nia Asocio denove staras ĉe vojkruciĝo. Hodiaŭ jam ne temas pri momenta komplikaĵo pro monkurzoj sed pri efektiva *distranĉo de tablotuko*. La perdo de gravaj landoj sentiĝas nun en malaltiĝo de la enspezoj, dum la ĉefaj elspezoj ne povas adaptiĝi. Unu el la ĉefaj elspezoj estas la salajroj por niaj administrantoj. La kongreso en Bournemouth faris gravan decidon, kiu praktike estas nenio alia ol reveno al la komenco de nia Asocio; nome, la Komitatanoj transprenas certajn laborojn por malŝargi la Administran Centron en Rickmansworth. Temas ne nur pri gvido de iu fako, sed pri efektiva plenumo de tuta branĉo de nia agado, ĉu interna, ĉu ekstera. Ni povas hodiaŭ bazi nian agadon sur la spertoj de jardekoj kaj scios eviti erarojn de la pasinteco.

Tuj post la militfino, pioniro de nia movado, D-ro Kamaryt, skribis al mi, ke nia movado trapasas sian *Biedermeier*-epokon (1815–1850), vivstilon simplan kaj modestan. Li pravis. Ni konstatas tion ja en ĉio, kaj ke niaj komitatanoj akceptis tiom gravan ŝarĝon pravas, ke ili komprenis la situacion kaj agis. Fine necesas averti aron da bonintencaj aktivuloj: ne postulu aferojn neplenumebajn; ne klopodigu niajn laborantojn per fantaziaj proponoj, sed konsciu, ke krom bona volo, necesas ankaŭ **mono, mono kaj ankoraŭ mono**. Ni konsciu simple, ke ni malriĉiĝis, kaj ni vivu laŭ tio.

Hans Jakob

SYNNØVE SOLBAKKEN

Bjørnstjerne Bjørnson

Plaĉa Norvega rakonto tradukita de
Edith kaj Aŭgust Weide

2ŝ. 3p. aŭ 9 rpk. aŭfrankite

Mendu ĉe U.E.A.

Mason Stuttard :

La rolo de la neŭtraluloj .

De tempo al tempo oni aŭdas la diron, "Mi volus subteni U.E.A., per aliĝo, sed mi jam apartenas al A—— kaj B——, kaj mi abonas al C—— kaj D——." Tio estas familiara "senkulpigo" kaj ĝuste pro tio, necesas ekzameni la validon de la premiso (ne esprimita, sed tamen subkomprenata), ke A, B, C kaj D rajtas aŭ meritas antaŭecon antaŭ la neŭtrala asocio. Ni rekonu tuj, ke la organizaĵoj A kaj B, kaj la periodaĵoj C kaj D plenumas utilan funkcion. Ili estas praktikaj elmontroj de Esperanto, kaj ĉiu provo je praktika apliko de la lingvo havas meriton.

Rigardante la Esperanto-movadon kiel tuton, ni vidas, ke ĝi konsistas el diversaj sekcioj, kiuj respektive aplikas Esperanton por la antaŭenigo de ia specifa ideo al kiu Esperanto estas ligita. Tiuj sekcioj plenumas reciprokan servon, propagandi Esperanton inter la samcelanoj, kaj sian privatan ideon inter la Esperantistoj ĝenerale. Esperanto do ĉe ili havas nur duarangan funkcion. Tamen ne ĉiuj sekcioj. U.E.A., reprezentanta la "neŭtralan" sektion, havas kiel ĉefan taskon la antaŭenigon de Esperanto, kaj ĝia Statuto difinas ĝin neŭtrala rilate al tendencaj ideoj partiaj, ĉu de politiko, ĉu de religio.

Longa sperto kiel preleganto pruvis al mi la vanecon, stari antaŭ publiko kaj propagandi Esperanton kiel, ekzemple, socialisto. Estas tuj evidente, ke mi interesus nur la ĉeestantajn socialistojn, sed fremdigus la nesocialistojn. Simile, se mi prelegus kiel katoliko, la nekatolikojn mi verŝajne ne tuŝus; kaj la samo validas pri ĉiu ajn starpunkto, kiun mi alprenus. Ŝajnas do memevidenta fakto, ke **la ĝenerala propagando de Esperanto devas stari sur bazo tute neŭtrala**, kaj la ekzisto de organizaĵo supertendenca, kies fako estas la antaŭenigo de Esperanto sen ia ajn alia konsidero, estas gravega afero ne nur por la prospero de la koncerna organizaĵo kaj de Esperanto entute, sed **de la ideoj, fakaj asocioj mem!** Fakte estas en la intereso de ĉiuj sekcioj de la Esperanto-movado, ke U.E.A. prosperu kaj floru ĉar ju pli ĝi sukcesas en sia laboro, ĉu senpere, ĉu per oficialaj instancoj, des pli da varbotoj estas kreataj por la aliaj fakoj de la movado. U.E.A. efektive plugas la virgan grundon el kiu ĉiuj aliaj sekcioj de la movado rikoltas!

Jam estas la modo en certaj rondoj, moki la neŭtralan movadon, kiel kolektivon de *poŝtmark-kolektantoj, turistoj, interŝanĝantoj de bildkartoj* k.s. Juĝi tutan familion laŭ la inklinoj de unu aŭ kelkaj el la anoj ne estas prudenta faro, kaj tiuj mokantoj ŝajne intence ignoras la valoregan kontribuon faritan de la neŭtrala movado en la

sferoj de literaturo, lingvistiko kaj tekniko, sen detala mencio pri la penetro en oficialajn rondojn kaj pri la altnivela kontribuo kultura de la Someraj Universitatoj de la neŭtralaj kongresoj. Tiu lasta fakto estas atingo sen precedento en kiu ajn alia sekcio de la movado!

Pro tiuj atingoj, kaj pro la *pionira* rolo de U.E.A. estas emfazinde, ke ne temas pri konkurenco inter U.E.A. kaj la sekcioj, sed ke temas pri **fakta malprospero de tiuj sekcioj aŭ fakmovadoj, se la neŭtrala movado malaperus!** La agado de tiuj ideoj organizaĵoj estus limigita al la ideo tereno. La fakaj movadoj plejparte varbas siajn anojn el la rezervoj de la Esperantistoj ĝenerale, el la neŭtrala movado. Do aktiva subteno de U.E.A. estas unu el la plej certaj rimedoj garantii la sukceson de sia sekcia movado kaj de la Esperanto-movado entute. Konservu de floranta, prospera U.E.A. tial estas **la unua devo** de ĉiu celkonscia Esperantisto.

Internacia prelegvojaĝo

Komisio de U.E.A., Prof. D-ro I. Lapenna, Estrarano, faros en la venontaj monatoj tre longan kaj detalan vojaĝon en diversaj landoj de Eŭropo. En la nuna momento D-ro Lapenna estas en Francujo kie U.E.F. organizas enlandan vojaĝon, sed li esperas poste viziti Belgion, Nederlandon, la skandinavajn landojn kaj Anglujon. Tio dependas, kompreneble, de eventualaj invitoj de tiuj landoj.

La temoj, kiujn prezentos D-ro Lapenna estas: (a) La Internacia Lingvo kaj ĝia rolo, (b) Jugoslavujo, lando de pitoreskaj urboj, mirindaj belaĵoj kaj antikva kulturo (kun lumbildoj), (c) Parizo la urbo de la 35-a (kun lumbildoj), (d) Kiel vigligi la Esperantomovadon, (e) U.E.A.-historio kaj nuna organizo, kaj (f) Unu temo el kampo de internacia publiko juro. Se necese D-ro Lapenna povos fari ankaŭ aliajn prelegojn kaj/aŭ gvidi perfektigan kurson.

Ĉi tiu prelegvojaĝo estas konkreta esprimo de deziro transdonita al kaj diskutita de la Komitato de U.E.A. en Bournemouth kaj la sukceso dependas de la respektivaj landaj asocioj mem, kies tasko estas inviti kaj respondeci finance kaj organize pri la tuta afero. Ni volas emfazi la grandegan propagandan valoron de tiaj prelegvojaĝoj kaj admoni niajn kunlaborantojn plejeble profiti la fakton, ke D-ro Lapenna—unu el niaj plej brilaj oratoroj—estas disponebla.

Kotizoj 1950! Por evitigi al vi interrompon en la regula liverado de la gazeto, kaj por helpi la administradon en la Centra Oficejo, bonvolu pagi vian kotizon kiel eble plej baldaŭ, se eble eĉ antaŭ la jarfino 1949! Antaŭdankon.

ORIGINALOJ DE BRENDON CLARK

Malnova pipo

*Mi ne scias, kia arbo en Eŭropo
Por la ĝuo de la homoj fine cedis
Vian belaroman lignon, mia pipo !
Tie nepre laodoro de la rozo
Kunmiksiĝis kun la spiro de violoj
Kaj fariĝis peza preskaŭ ĝis videblo
Tiel, ke folioj sur la patra trunko
Pendis en petale parfumita sveno . . .*

*Vi malnova estas, nigra ĉe la rando,
Aĝmatura kaj cikatriĝinta ; tamen
Vi neniam perdis la antaŭan ĉarmon,
Kaj al digno nun aldonas sentimenton.
Kia trankviliĝo estas, rigardadi,
Kiam en amorfaj ombroj via fumo,
Preskaŭ pala substancigo de la pensoj,
Ŝanceliĝe flosas supren tra l'aero
En la altan dormsilenton ; aŭ kirliras
Per ŝvebantaj rondoj, kiel laca menso,
Kiu donas sin senrege al memoroj,
Rondiradas, kaj finiĝas per nenio . . .
Rememoroj pri la longpasinta tempo
De ankoraŭ juna kaj feliĉa vivo :
Pri vizaĝo kies belo jam pliĝas,
Revidite tra nebulo de la jaroj ;
Pri la eĥo de malfortiĝinta voĉo,
Flustro en la koridoroj de la tempo ;
Pri la amo, kiun—tiel !—mi forgesis ;
Aŭ pri tiuj horoj de sunora lumo,
Kiam ondojn de la multkolora maro
Nia blanka velboato kline ŝiris,
Ĝoje forĵetante la ŝmacitan ŝaŭmon,
Dum glitfluga mevo super nia masto
Alte gardis nin, anĝelo de la suno.*

*Travivaĵoj reviviĝas kaj remortas :
La rivera helo kaj la monta neĝo,
La senfina vojo, la izola arbo,
La soldata kanto, la pieda ritmo . . .
Ho magia povo, ho aminda sorĉo !
Mi ne fidas al estonto nefidinda :
Tamen, vi, amiko kara kaj konstanta,
La esperon donos ĝis ne plu mi revos ;
Tiam mi min ligos kun animo via,
Kaj retrovos kion mi ĉi tie perdis.*

La tineo

*Vidu, kompatinda naivulo,
Kiu al la lumo tro sopiris—
Vi flugilon perdis en la brulo
De la flamo kiu vin altiris.*

*Pli prudente estus, ke profundon
De malhela ombro vi toleru,
Ol ke via belo spertu vundon,
Kaj vi mem pri ĉio malesperu.*

Mallumo

*Malluma la mondo, kaj en la mallumo
La steloj sin kaŝas per nubo de fumo,
Demonoj de fajroj la urbojn detruis,
Kaj rŭgaj pro sango riveroj ekfluis ;
Kolero aŭdiĝis per krio kaj vorto,
Kaj ĉie haladzis odoro de morto,
En brua mallumo.*

*La suno sin levis kaj per ĝia klaro
Vidiĝis entute la monda amaro :
La fruaj radioj ektuŝis bluflame
La stalajn glavpintojn uzitajn malame :
Kaj ĉirkaŭ la cindroj ankoraŭ ardantaj,
Kadavroj fariĝis amasoj gigantaj.
La homoj rigardis kun ega mizero
Viktimojn de tiu ĉumokta kolero,
Kaj vidis la korpojn de filo kaj frato,
Amiko, najbaro, kaj bona konato,
Por kiuj la fino, la vivoplenumo,
Alvenis senglore per kugla alzado.
Kaj de l' malamikoj nenio postrestis,
Nenio pri ties ekzisto atestis . . .
Verdire, la malamikaro ne estis,
Sed nur la mallumo.*

Realo

*Nun, nur nun, realo estas, en la penso
Ke mi vidas vin, ke vin mi tuŝas :
La estonto estas fiktiva,
La pasinto jam en la memoro kuŝas ;
Sole la nuntempo estas viva—
La ceteraj nur la figuraĵoj de la menso.*

*Vi asertis, ke la vivo kaj realo
Daŭros kiel daŭros ĉiu vero.
Tamen via voĉo jam silentas . . .
Vi forestas . . . ĉio ŝajnas nun ĥimero . . .
Ĉu mi sonĝis, ke ni argumentas ?—
Nur momenton nia nuno restas aktuala.*


Pro amiko

*Dion danku pro amiko,
Kies amo kuraĝigas—
Kies bona opinio
En privato kaj publiko
Al pravigo vin instigas.*

*—Kies alfidindaj vortoj,
Kies nepre bonhumoro,
Kies tuta simpatio,
Estas ĉiam novaj fortoj
En la vivo kaj laboro.*

TRA LA LIBRARO

*=akireblaj ĉe U.E.A.



***La alia Ameriko** de Svetoslav Minkov; trad. Georgi Hršev. Eld. Bulgara Esp. Kooperativo. 21×14cm. 110 p. broŝ. 3 ŝil. aŭ 12 rpk.

afrankite.

Mi malfermis la libron. La paĝoj disiĝis de la kovrilo. En la unua linio mi legis *atlas*on anstataŭ *maplibron*. En la unua alineo mi rimarkis du preserarojn. Kaj mi pensis, "Jen denove fuŝe tradukita, presita kaj bindita verko, kiun apenaŭ valoras legi." Kaj kun la martira devosento de recenzisto mi komencis legi.

Leginte du paĝojn, mi ridetis kaj miris. Mi, kiu estas fervora notanto de preseraroj kaj neologismoj, jam apenaŭ rimarkas ilin. La rakonto tiom tenas mian atenton kaj intereson per siaj trafaj metaforoj kaj glata fluo. Ree mi dankas Esperanton, ke ĝi peras al la ekstera mondo valoran verkon el la literaturo de malgranda nacio.

La rakonto ne estas romano. La verkinto priskribas vojaĝon, kiun li faris per ŝipo en 1936 de Ĝenovo al Dakar kaj trans la ekvatoron al Brazilo kaj Argentino. Lia verko enhavas iom de la karaktero de *La Romano de San Michele* kvankam la aŭtoro ne uzas la vorton *mi*. Li ne limigas sian priskribon al turistaj vidaĵoj. Ankaŭ la malbela flanko de la vivo ricevas atenton de lia ofte amara spirito. La realismo de la rakonto estas tamen iom difektita per kelkaj ŝajne fikciaj anekdotoj kaj per tre kalumnia opinio pri la kvalitoj de la brazila civitano. Tio ŝancelas la fidemon de la leganto pri la efektivaj faktoj en la libro.

La traduko estas adekvata sed ne modela. La uzo de *nek* anstataŭ *eĉ ne*, *deel* anstataŭ *simpla el* kaj la sufikso *oz* (*sunoz*a, *ostoz*a, *enigmoz*a) estas kritikinda. Multajn vortojn komencanto ne trovas en sia vortaro. El la neologismoj la plimulto estas nenecesaj, ekz. *feodalismo* (*feŭdismo*), *lumini-scenco* (*fosforesko*), *embalaĝo* (*pakpapero*), *ansamble* (*kune*), *hipokrizio* (*hipokriteco*), *hermelinaj* (*ermenaj*), *destrukti* (*detrui*), *projekti* (*projekcii*), *ultrapraktika* (*praktikega*). Kvankam oni povas ofte diveni la signifon de neologismo per la kunteksto, restis enigmoj por mi *magnito*, *pasat-ventoj*, *hunantoj* kaj *utinam*. Por okuloj de angla Esperantisto *landlordo* estas konfuza kaj *kovbojo* (*vakero*?) monstra. Estas bedaŭrinde, ke la verko ne estis kribrita antaŭ sia eldono.

E. P. Ockey.

***Maŝinoj, Mono kaj Mondpaco** de C. M. Hattersley. Eld. La Socikredita Kunordiga Centro. 18×12.5cm. 60p. broŝ. prezo 2 ŝil. aŭ 8 resp. kup.

Jen 60-paĝa libro, kiu meritas la atenton de ĉiu serioz-pensa Esperantisto ĉar ĝi pritraktas ekonomian temon kaj montras, ke pri ĉi tiu grava flanko de la socia vivo (pri kiu la nacia teknika lingvaĵo estas ofte nekomprenebla al la ordinara homo) iuj Esperantistoj kapablas esprimi konceptojn en flua, facile komprenebla kaj ĉiel admirinda maniero. Mi diras iuj, ĉar mi ne scias la proporciojn de helpo, kiujn donis al la verkinto S-roj Stuttard, Leslie, Roelof kaj Capp, al kiuj li esprimas dankon.

Ĉiu el la 50 sekcioj de la libro pritraktas pensunuon kaj tio multe helpas al la kompreno de la rezonado. La aspekto de la libro estas plaĉa kaj la presado bonega kaj senerara. Mi bonvenigas kaj senrezerve gratulas la presistojn *Esperanto Printers Limited*.

La libro enhavas lertan resumon de la ideoj publikigitaj de Douglas, Colbourne kaj Holter, la ĉefapologiistoj de Socikredito. Tiuj estas (1) ke sub la ekzistanta prez-sistemo la mono distribuata (kaj tial formanta aĉetopovon) ne sufiĉas por aĉeti la varojn produktitajn, (2) ke pro tio la registaro devus disdoni ekstran aĉetopovon al konsumantoj, (3) por eviti inflacion la registaro tion faru per sistemo de "nacia diskonto" rilate al ĉiu varo vendita, (4) krom tio la registaro donacu al ĉiu homo monsumon kiel "nacion dividendon", kiu reprezentu la *kreskon* en la nacia riĉo efektivigitan, tra la jaro, de la tuta komunumo.

Pri nur unu—sed tre grava—punkto Hattersley malkonsentas kun la aliaj. Laŭ li, la proponita disdono de la "nacia dividendo" devas esti, ne el tiucele kreata ekstra mono, sed per la redistribuado de ekzistanta mono aŭ kredito—do supozeble el la produkto de impostoj sur personaj enspezoj aŭ deviga forpreno de proporcio de persona kapitalo.

Neniu reputacie konata ekonomiisto akceptas la pretendojn de Douglas. Ili diras (1)—pozitive—ke la baza teorio de Douglas ne plene reprezentas la fluon de mono; kontraŭe, ke ĉiaj kostoj estas elspezoj kaj ĉia elspezo estas ies enspezo, (2)—negative—se la "A plus B"-teorio estus vera, ĝi aplikiĝus al la tuta mondo kaj estus facila tasko demonstri, ke la tuta komerca sistemo estus bankrotinta jam antaŭ multaj jaroj, (3) ke la rapida pliigo de aĉetopovo—ĉu en formo de diskonto aŭ ekstra mono—nepre rezultigus inflacion, (4) ke la dispago de "nacia dividendo" (a) el nove presita mono rezultigus inflacion (b) el impostoj estas kruda redistribuado de mono.

Do legu la libron; sed nepre legu ankaŭ la kontraŭajn argumentojn.

W. A. Gething.

ESPERANTO KAJ RADIO

Mallongigoj : I=Informoj, P=Parolado, K=Kurso.

Ĉiutage	14.45–15.00	Praha. 1935m. kaj 31.41m. I. Ĉeĥoslovaka Radio, Esp.-sekcio, Stalinova 12, Praha XII.
	17.15–17.30	Paris. 48.82m. Radio-diffusion Francaise, 118 Champs-Elysées, Paris 8.
	18.45–19.00 21.00–21.15	Sofia. 39.11m. P. Radio Sofia. Praha. 49.92m. P.
Dimanĉo	23.30–23.35	Budapest Kossuth. 549.5m. I. Budapest VIII, Bródy Sándor u.7.
	05.30–05.35	Wien. 506m., 31m., 41m. I.
Lundo	07.15–07.30	Sveda Radio. 49.46m., 19.80m. P. Sveriges Radio, Stockholm 7.
	15.15–15.30	Sveda Radio. 19.80m., 27.83m.
	21.45–22.00	Praha 470m., 325m., 259m.
	23.30–23.35	Budapest Kossuth (kiel je dimanĉo).
Mardo	01.15–01.30	Sveda Radio. 49.46m., 31.46m.
	08.05–08.20	Paris. 386.8m. K. (Ĉiun duan mardon de 18.X)
	11.55–12.00	Bern. 48.66m., 31.46m., 16.87m. P. D-ro Baur. SRG, Kurzwellendienst, Neuengasse 28, Bern.
	14.15–14.30	München. 405m. kaj 48.70m. kaj Nürnberg 315.8m. K. (ĉiun duan mardon). Radio München, Kulturabteilung, Rundfunkplatz 1, München, Bayern, Germanujo.
	17.40–17.45	Bern. Kiel je 11.55, sed anst. 16.87m. sur 19.60m. (Krom la unua mardo).
Merkredo	19.15–19.30	Warszawa III. 48.23m. I. Pola Radio, Warszawa, Koszydowa 8.
	21.45–22.00	Praha kiel lunde.
	22.15–23.00	Praha II. 269m., 325m., 219m. Verda Stacio nur la unuan merkredon. Stalinova 12, Praha XII, ĈSR.
	23.30–23.35	Budapest Kossuth (kiel je dimanĉo).
Ĵaŭdo	11.55–12.00	Bern. Kiel marde. D-ro Privat.
	17.40–17.45	Bern. Kiel marde. D-ro Privat.
	22.00–22.10	Ostrava. 259m.
Vendredo	15.40–15.55	Wien. 228m., 25m., 31m., 41m. I. Ĉiun duan vendredon. Radio Wien, Argentinierstr. 30a, Wien IV.
	20.50–21.00	Praha. 269m., 325m., 470m. I. Stalinova 12, Praha XII.
	23.30–23.35	Budapest Kossuth (kiel je dimanĉo).

Klarigo—En la tabelo la horoj de la dissendoj estas laŭ la horsistemo de Greenwich. Por Mez-Eŭropa tempo oni aldonu unu horon.

Invito—Ni serĉas konstantan kunlaboranton por la fako Radio. Nur fidinda kaj konscienca aŭskultanto anoncu sin al la C.O. en Rickmansworth.

ESPERANTISTA VIVO

Naskiĝoj

Herrero al S-ro D-ro R., en Valencia, Hispanujo naskiĝis 2-an de Sept. filino Carmen.

Luna al Ges-roj R. de, en Barcelona, Hispanujo, filino Gema.

Edziĝo

Hartley-Cockroft, Je la 2-a de sept. en Ossett, Anglujo, J. Hartley kun F-ino V. K. Cockroft, ambaŭ fervoraj samideanoj kaj subtenantoj de nia movado. Plej sincerajn gratulon kaj salutojn !

Niaj mortintoj

Ni eksciis kun bedaŭro pri la forpaso de la jenaj samideanoj. Al iliaj familianoj ni esprimas nian profundan kondolencon.

As, J. van, en aŭgusto en Antwerpen, Belgujo.

Bye, F-ino Rosa, la 28-an de aŭgusto post 2-taga malsano. Kiam en 1906 fondiĝis la unua Esperantista Klubo en Oslo (tiam *Christiania*) F-ino Bye fariĝis ĝia unua sekretario kaj plenumis tiun oficon ĝis 1912. Dum siaj 43½ jaroj de fidela Esperantista vivo ŝi okupis diversajn oficojn en la movado, inter aliaj : membro de gazetara komitato, kunfondinto kaj prezidanto de Norvega Asocio de Geinstruistoj. Esperantistaj, vicprezidanto de Norvega Esperantista Ligo, prezidanto de la Ekzamena Komisiono de N.E.L., estrino de la Koresponda Kurso de N.E.L. Pro multjara servo estis elektita Honora Membro de N.E.L. F-ino Bye estis kvietaj, modesta, mildanima homo, amata de lernantoj, kolegoj kaj gesamideanoj. Por ŝi la Interna Ideo estis la plej grava flanko de Esperanto. La norvega movado suferis gravan perdon pro ŝia tro frua morto sed oni ĉiam konservos dankan memoron pri tiu nobla batalantino por Esperanto.

Rosen, Charles, sepdekokjara, en La Chaux de Fonds, Svislando, septembron 1949. Esperantisto de 1907. Gvidis multajn kursojn kaj kunlaboris kun *Esperanto* de U.E.A. per tradukoj, precipe el la rusa literaturo, kaj originaloj. Delegito de U.E.A. Ano de provizora komitato 1936–1942. Sincera homarano kaj respektita komercisto.

Erich Wald :

Glacivento kaj torento

“Ankoraŭ vi saltas tra la ŝtonar’,
La vintron obstini arogas !
Vi estas pigme’—la vintro barbar’,
Pri via barakt’ ĝi nur mokas.
La vintro malamas vivon de l’ ter’,
Ĝi ankaŭ vin volas detrui.
Eĉ via majesta frat’ la river’,
Venkite jam devis ĉesflui !”

“Ha, mia malvigla frat’ en la val’
Laciĝis fluante sen forto,
Sed vigle mi agas dum la batal’
Blovegu do vento el nordo !”

Nia Felietono :

KAPTITOJ DE LA GLACIROKOJ

F. Omelka

VIII. La malsupreniro (*daŭrigo*)

“Helpon !—Helpon !—Helpon !—Helpon !—
Helpon !—Helpon !”

Tiel instruis lin la spertaj montgrimpuloj. Se oni voĵeraras en la montoj, aŭ se oni kuŝas ie vundita kaj ne povas sin movi de la loko, donu kiun ajn signon sesfoje dum unu minuto, en egalaj tempintervaloj.

Sesfoje dum unu minuto. Li ridis. Kia frenezaĵo—kredi, ke iu povos lin aŭdi ĉi tie ! En la regiono, en kies ĉirkaŭaĵo estas nenio alia ol glacio kaj neĝo, neĝo kaj glacio, glacio kaj neĝo. Kaj silento.

Ĉu frenezaĵo ? Eble. Ne, tute certe. Sed kio alia restas—li jam sentas, kiel li frostiĝas—

“Helpon !—Helpon !—Helpon !—Helpon !—
Helpon !—Helpon !”

Sesfoje dum unu minuto. En regulaj tempintervaloj.

Ankoraŭfoje li volis provi grimpi, sed li nur pene stariĝis kaj tuj refalegis.

Li turnis la kapon al la truo. La firmamento estis pura, sen unusola nubo. Suno, la bruliga montar-suno disdonas al la homoj ridetojn. Al la homoj ? Kie estas la homoj ? Tie, sur la glaciroko. Kaj plue tie en la malproksimo en Parizo en la karcero—

Kia kruelo !

Kaj poste li nur mallaŭte, mallaŭte ĝemis :

“Helpon !—Helpon !—Helpon !—Helpon !—
Helpon !—Helpon !”

Sesfoje dum unu minuto, atentu, kamarado, por ke vi ne eraru ! Sesfoje—

Firmamento ! Suno ! Daumal !

En la truo de la kreviĝo aperis barbokovrita vizaĝo de viro. Li rigardis internen kaj per tondra voĉo vokis :

“Do kial vi ne aŭdigas vin, homo ? Ni vokis vin, kaj vi—”

Sed tio jam estis super la fortoj de Payen.

Li fermis la okulojn kaj senkonsciiĝis.

IX. La verdikto

La blanka ĉambro de la malsanulejo en Interlaken dronis en inundo de sunradioj.

Kelkaj pacientoj legis ĵurnalojn, aliaj kune duonlaŭte interbabilis.

La kuracisto staris apud la lito, super kiu pendis tabuleto kun la surskribo :

MARCEL PAYEN, 33 jara.

“Ĉu li ankoraŭ ne rekonsciiĝis ?” li demandis la flegistinon.

“Ne, sinjoro Doktoro.”

“Ĝis li vekiĝos, li devos havi absolutan kvieton.”

“Jes, sinjoro doktoro.”

Kiam vesperiĝis, li fine malfermis la okulojn. Li kuŝis en la malsanulejo jam la trian tagon. Elartikigita maleolo, cerbo-skuo, elĉerpiĝo. Vundo en la vizaĝo.

Flegistino donis al li teon. Li trinkis avida, senvorte. Poste li fermis la okulojn kaj dormis denove tutan nokton.

Li matene vekiĝis la unua el la pacientoj en la ĉambro.

Kie li estas ? Kio okazis al li ?

Li rememoris. En la kapo estis morta silento. Silento kaj malpleno.

Li sidiĝis sur la lito. Li rigardis sian tabuleton. Marcel Payen ?

Li frotis la okulojn. Do kio estas ? Ĉu li vivas ?

Poste li turniĝis.

“Sinjoro Payen !” aŭdiĝis apud li.

La bandaĝita nazo, arĝentaj haroj, ridema vizaĝo.

“Sinjoro generalo !”

“Silentu ! Ne tiom laŭte !” admonis lin generalo Gibson. “La flegistino koleros !”

Kaj jam estis ĉi tie la ceteraj pasaĝeroj, kiuj povis piediri. Ili ĉirkaŭstaris Payen, premis al li la manojn.

“Kiamaniere vi ĉi tien . . . kaj precipe, kiamaniere mi venis en la malsanulejon ?”

General Gibson al li ĉion mallonge klarigis.

La grupo de “Sav-sindikato de svisaj alpinistoj”, kiu konsistis el dudek viroj, havis la taskon serĉi la perditojn en la Bern-Alpoj en la ĉirkaŭaĵo de Interlaken. Survoje ĝi aŭdis help-vokon. Ĝi iris laŭ la voĉo, ekvidis la truon kaj trovis tie Payen. Puŝbatitan, sangantan, duonfrostigitan. Ili eltiris lin sur la surfacon kaj dividiĝis. Kvar viroj transportis Payen en Interlaken-on, la resto iris

laŭ liaj freŝaj postsignoj. Kun la ekspedicio iris ankaŭ la kuracisto. Li flegis sur la loko la vunditojn kaj tuj oni ekvojaĝis reen. Ili devis marŝi ankaŭ dumnokte, ĉar la vundoj de iuj pacientoj bezonis tujan intervenon.

“Se oni venus nur unu tagon pli malfrue, kelkaj el ni jam ne vivus,” finis sian klarigon Generalo Gibson. “Almenaŭ tute certe ne mi. Mi jam ricevis tiom da injektoj !”

Dum lia rakontado Marcel Payen tute rekonsciiĝis.

Subite li rapide leviĝis :

“Amikoj kiun daton ni havas hodiaŭ ?”

“Dudekkvaran de novembro.”

Payen renversiĝis sur la kusenon kaj senvorte rigardis al la plafono.

“Sinjoro Payen, kio okazis al vi ?” ili demandis komplete.

“Daumal !” li elspiris peze.

“Trankviliĝu,” diris Generalo Gibson. “Jen mi havas la hieraŭan *Paris Soir*. Ĉi tie estas ankaŭ la artikolo pri la proceso kun sinjoro Daumal. Mi tralegos ĝin al vi.”

“Ne, ne, dankon mi mem !”

Payen prenis la ĵurnalon kaj legis :

“Aparta komuniko de *Paris Soir* ! SENSACIA TURNIĜO EN LA PROCESO KUN DAUMAL ! La atestanto Marcel Payen vivas ! La proceso prokrastita ĝis alveno de la ĉefatestanto !”

(Finota)

Intervjuo kun pioniro : M. Solovjev


Sur la paĝoj de nia revuo la legantoj de tempo al tempo legis versaĵojn, kiuj portas ilin momente malantaŭen en la tempo. Kun ili ni ricevas spiron de la epoko, kiam Esperanto estis ankoraŭ juna. Ili estis versaĵoj de Miĥael Solovjev, 75-jara pioniro de nia lingvo, nun loĝanta en Cavtat, Jugoslavujo. Ni tial opinias dece prezenti nian malnovan samideanon al niaj membroj.

M. Solovjev naskiĝis 26-an de oktobro 1874 en Odessa. Frue en la vivo li elmontris eksterordinaran talenton je la kantarto kaj posedis—laŭ raportoj—mirindan tenorvoĉon. Oni povas judi la rangon de lia voĉo per la fakto, ke li estis invitita aliĝi al la Operteatro en Moskvo. Li tamen preferis la juron kaj alprenis tiun profesion. Kiel amatoro, li rolis en diversaj operoj, *Faŭsto*, *Aida*, *Sonoriloj de Kornevilo* k.s. en Odessa, Kiŝinjev kaj Novi-Sad, kaj siatempe estis direktoro de la Regna Muzika Lernejo en Kiŝinjev, Besarabio, kaj prezidanto de la Popola Konservatorio en Odessa.

Krom la muziko M. Soloviev havis vastajn interesojn kiel indikas la fakto, ke li estis

prezidanto de la fotografiaj societoj de Odessa kaj Kiŝinjev, kaj estis pasia ŝakisto kaj sportisto. Li instruis jursciencon en gimnazioj kaj poste fariĝis juĝisto. Pri juro li verkis *La Lernolibro de Jura Scienco* aprobitan de rusa ministerio kaj uzita en ĉiuj gimnazioj de Rusujo, kaj iam tradukis *Scienca Fundamento de Okultismo*.

Por ni aparte interesa estas tio, ke M. Solovjev fariĝis Esperantisto en 1889 kaj en tiu jaro verkis sian unuan versaĵon *Akcipitro kaj Falko* ; sekve li ĉi-jare en Novembro festas sian 60-jaran jubileon kiel Esperanto-poeto ! Tiu versaĵo aperis en *La Esperantisto* en 1891 (?) kiam ĝi estis presata en Nürnberg, kaj poste Trompeter aperigis plurajn poemojn liajn, el kiuj Zamenhof elektis por la *Fundamenta Krestomatio* la versaĵon *La Plendo* kaj la tradukon *Tri Palmoj*.



Miĥael Solovjev

En la *Adresaro* S-ro Solovjev troviĝas kun numero 411. Li estis prezidanto de la Esperanta Societo de Kiŝinjev de 1913 kaj de la Societo en Odessa.

Ni salutas nian samideanon kaj esperas, ke la nuna jubilea jaro alportas al li feliĉon kaj sanon.

M.S.

L'Essor, journal d'information au service de l'Esperanto. Administracio kaj redakcejo : Imprimerie G. Castel, 47 Avenue de Toulouse, Carcassonne, Francujo. Franclingva periodaĵo dediĉita al propagando de Esperanto. 1-a numero enhavas gravan artikolon de S-ro Generalo Bastien.

Al Parizo !

La estonta Kongreso de Esperanto okazos en Parizo de la 5-a ĝis la 12-a de Aŭgusto 1950. Tiu dato estos grava, laŭ ni, por Esperanto. Kvin jarojn post la milito la mondo estas fortrenata en rapidegan kuradon, kiun favoras la perfektigo, ĉiutage pli granda, de la mekanikaj laboriloj. Oni bezonas en sama mezuro pli kaj pli metodan laboron por organizi pli rapidajn interlandajn komunikilojn por interrilati.

La tempo estas veninta por pruvi al la mondo, ke nia lingvo estas necesa kaj taŭga por la moderna vivo. Se ni ne tuj alportos tiun pruvon ni devos malaperi. Pro tio ni havas nun la devon fari grandegan penon por trudi la uzon de Esperanto sur la scienca, komerca kaj industria terenoj, kaj ni havas la konvinkon, ke ni sukcesos.

Parizo estas bonege elektita por permesi tian uzadon kaj doni al tiu elmontro la tutan dezireblan ĝeneralecon. La restarigo de la internaciaj transportrimedoj faciligos en ĉiu lando la partoprenon de niaj samideanoj en manifesto, kiu devos esti atesto de nia forto kaj de nia frateco.

Ni kore invitas ĉiujn el niaj amikoj kunveni en urbo, kies sennombraj artaj riĉaĵoj estas preskaŭ mirakle konservitaj dum la milito, kaj kiujn oni devas koni, aŭ revidi, se oni ilin jam vidis.

Ni faros ĉion eblan por ke neniŭ bedaŭru sian partoprenon en Kongreso, kiu prezentos ĉiurilate unikan intereson. Tial, por ke ĉiuj samideanoj povu troviĝi en Parizo en vastega kunsidantaro, ni decidis kun la plena aprobo de la Internacia Komitato, forte malaltigi la kongresan kotizon por la gejunuloj. Tiu kotizo, ĝis la 31-a de decembro estos nur tricent francaj frankoj.

Ni decidis due realigi por la gejunuloj kaj ankaŭ por la kongresanoj, kiuj tion deziras, kun la helpo de la Ministerio de la Nacia Edukado, kolektivajn komfortajn dormejojn kaj manĝejojn por kiuj oni pagos nur la duonon de la sumo, kiun oni devas pagi en modesta hotelo.

Oni do povas de nun sendi al ni sian kotizon en la kondiĉoj montritaj sur la aliĝilo en ĉi tiu numero.

Karaj geamikoj, fidu al ni kaj venu multnombre al Parizo. Vi estos tutkore kaj ĝoje akceptataj.

*Georges Warnier,
Prezidanto de L.K.K.*

35-a Universala Kongreso de Esperanto Parizo, 5-12 aŭgusto 1950

INFORMOJ pri la 35-a Universala Kongreso de Esperanto en Parizo, Francujo, 5-12 aŭgusto 1950.

Loka Kongresa Komitato: Prezidanto: S-ro Georges Warnier; Ĝenerala sekretario: S-ro Jean Couteaux; Konstanta sekretario: S-ro O. T. Nicolaisen; Komitatanoj: S-ro Paul Boulet, S-ro Jean Guillaume, F-ino Huguette Royer kaj S-ro Raymond Schwartz.

Adreso: 35-a Universala Kongreso de Esperanto, 62, Avenue de Clichy, Paris—18, France.

Kongresejo: La Sorbonne (Universitato).

Kongreskotizoj:

			ĝis 31.12.49	ĝis 31.3.50	poste
Kongresano	..	fr. fr.	1500	1800	2000
Edzo aŭ edzino de kongresano	..	„ „	750	900	1000
Junul(in)o ne pli ol 20-jara	..	„ „	300	400	500
Subtenanto (Ne ricevos kongreskarton).					
Minimume	..	„ „	1000	1000	1000

Pagoj: Estas akceptataj ĉiuj pagiloj ŝanĝeblaj en bankoj, poŝtmandatoj k.t.p.

Kiel pagon por la kongreskotizo ni *ne* akceptas poŝtmarkojn aŭ varojn, sed ni povos akcepti ĝuste stampitajn internaciajn respondkuponon laŭ la tarifo 1 rpk=25 fr.fr.

Aliĝiloj: Haveblaj ĉe la Kongresoficejo; U.E.A.; U.E.F. kaj aliaj landaj asocioj. Aliĝo validas nur kun samtempa paĝo. Skribu la nomon kaj adreson tre klare, prefere per maŝino aŭ per literoj similaj al presliteroj.

Kongreskarto: Tuj post la ricevo de la aliĝilo kaj kotizo, L.K.K. sendos al vi la definitivon kongreskarton.

Informpetoj: Al informpetoj bonvolu aldoni internacian respondkuponon.

Glumarkoj, afiŝo kaj broŝuro pri Parizo ne ekzistas, do, ne petu pri tiuj.

Fakkunsidoj: Tiuj, kiuj volas aranĝi fakkunsidojn, estas petataj sendi informojn al ni kiel eble plej frue, kun indiko pri la probabla nombro da ĉeestantoj.

Pri loĝejoj kaj *ekskursoj* ni informos vin poste.

La Kongresa Programo: Ni povas jam nun mencii kelkajn partojn de la programo:

Interkoniga vespero,
Solena malfermo,
Diversspecaj diservoj,
Laborkunsidoj,
Fakaj kunsidoj,
Teatra vespero,
Kongresa balo,
Internacia somera universitato,
Floraj ludoj,
Filmprezentadoj,
Oratora konkurso,
Sporto,
Ekskursoj.

Limigo: Notu la jenan gravan informon pri aliĝoj al la kongreso: Ni *ne akceptos* kongresaliĝojn post la 1-a de julio 1950.

L.K.K.

***Parizo, nia vilaĝo.** Gvidlibro 64-paĝa; eld. S.A.T. 21×14cm. Ilustrita kun planoj de urbo-partoj kaj kolora plano de la urbo. Prezo 3ŝ. 6p.


Ĉi tiu gvidlibro informas en naŭ promenadoj pri multaj sciindaĵoj. Iom strange impresas la leganton la uzo de fonetike skribitaj nomoj, kiaj *Ŝajo, Sejno, Luvro, Tegoleja ĝardeno, Elizeaj Kampoj, Efel-turo, Kasteleta placo* kaj aliaj. La libro estas plaĉe presita, teksto konciza kiel en gvidlibroj ĝenerale. Sen preseraroj.

H.J.

ENIGMA KONKURSO N-ro 42

Solvojn oni sendu al S-ro P. H. Mooy, 20A Avenue Molière, Brussel-Forest, Belgujo.

Enigmo N-ro 87 : Sesangula enigmo. Ĉiu el la ses fakoj ĉirkaŭ numerita sesanguleto devas enhavi unu literon. Tiuj ses literoj formas vorton. Ĉe la klarigo de ĉiu vorto troviĝas interkrampe du literoj. La unua indikas (laŭ la flanko presita sesangula steleto) la fakon en kiu komenciĝas la koncerna vorto ; la dua indikas la lokon de la dua litero de tiu vorto. Tiun manieron, kiu ebligas uzi ĉiam la saman kliŝon, indikis al mi S-ro Georg Englert en München, kiu ankaŭ sendis la serion de vortoj. La signifoj de la 19 vortoj estas : 1. Kunigo (DC) ; 2. tajdo (CD) ; 3. agrikultura ilo (ED) ; 4. sento de sufoko (ED) ; 5. tion prenis monaĥino (FE) ; 6. muelaĵo (BA) ; 7. okulmembrano (DE) ; 8. eŭropano (BA) ; 9. muzika intervalo (EF) ; 10. malagraba planteto (BC) ; 11. birdo (FA) ; 12. tion vi serĉas (FE) ; 13. tia ligno estas uzata por mebloj (CD) ; 14. litniĉo (ED) ; 15. vortparto (CB) ; 16. delikata agato (AF) ; 17. malo de rarege (CD) ; 18. plaĉa (BA) ; 19. fanfaronon (BA).



Enigmo N-ro 88 : La kvin ĉemizoj : Iun tagon Vilĉo, Jozefo, Georgo, Filipo kaj Tomaso rigardis tra la fenestro de magazeno, kie montriĝis ĉemizoj flavaj, bluaj, verdaj kaj brunaj. La kvin junuloj eniris, kaj baldaŭ elvenis, ĉiu kun pakajo sub la brako. En ĉiu pakajo estis unu ĉemizo. Sed kiun koloron elektis ĉiu junulo ? Por fari el tio enigmon ili decidis, ke :

1. La portanto de blua ĉemizo diru la veron pri si mem sed mensogu pri la amikoj.
 2. La portanto de verda mensogu pri si mem, sed diru la veron pri la amikoj.
 3. La portanto de flava ĉiam diru la veron.
 4. La portanto de bruna ĉiam mensogu.
- Poste ili diris la jenon :
- I : Vilĉo : Jozefo havas flavan, sed neniun el miaj amikoj elektis tiun koloron. Filipo kaj mi havas bluajn.
 - II : Filipo : La ĉemizoj de Jozefo kaj Tomaso estas samkoloraj.
 - III : Jozefo : Vilĉo havas verdan, sed neniun el la aliaj amikoj elektis verdan. Tomaso havas bluan.
 - IV : Georgo : Mi havas flavan.
 - V : Tomaso : Filipo havas verdan. Vilĉo ne havas verdan. Jozefo havas brunan.

Kiun koloron elektis ĉiu junulo por sia ĉemizo ? Aldonu la argumentadon. (Ensendis S-ro A. G. Rickwood, Anglujo).

Enigmo N-ro 89 : Se de lundo ĝis sabato (tiuĵ du tagoj inkluzive) pluvis sesoble tiom, kiom pluvis dimanĉe, kaj se de dimanĉo ĝis vendredo (tiuĵ du tagoj inkluzive) pluvis sepoble tiom, kiom pluvis dimanĉe, kiom pluvis sabate ? Aldonu la argumentadon. (Ensendis S-ro G. Rust, Anglujo).

INTERNACIA KONKURSO 1949

Stato je 30-a de Septembro

Lando	Kvoto	Poentoj	%
1. Jugoslavujo	1600	3245	202.8
2. Islando ..	500	650	130.0
3. Svedujo ..	4100	4989	121.7
4. Belgujo ..	1700	1951	114.7
5. Portugalujo	700	765	109.3
6. Germanujo ..	1600	1700	106.2
7. Usono ..	3000	2968	98.9
8. Aŭstralio ..	950	935	98.4
9. Brazilo ..	2000	1896	94.8
10. Danlando ..	3200	3015	94.2
11. Britujo ..	13000	12185	93.7
12. Nederlando	5400	5020	93.0
13. Urugvajo ..	250	230	92.0
14. Nov-Zelando	900	824	91.5
15. Svislando ..	1400	1265	90.4
16. Polujo ..	4000	3595	90.0
17. Italujo ..	1600	1425	89.0
18. Sud-Afriko ..	250	210	82.0
19. Francujo ..	6200	5073	81.8
20. Argentino ..	900	725	80.6
21. Finnlando ..	2000	1595	79.8
22. Norvegujo ..	1300	1020	78.5
23. Egiptujo ..	300	225	75.0
Kanado ..	300	225	75.0
24. Hungarujo ..	1800	1295	71.9
25. Izraelo ..	400	240	60.0
26. Irlando ..	300	170	56.6
27. Aŭstrujo ..	1000	565	56.5
28. Hispanujo ..	1200	510	42.5
29. Bulgarujo ..	1600	310	19.4
30. Ĉeĥoslovakujo	5300	545	10.3

Stenografio laŭ la sistemo de Melin. Aranĝita por Esperanto de Otto A. Nilsson. 1 sveda kr.

Mary kaj Sulo : koresponda rakonteto de Kamemoro uzata kun **Vägvisare Till Världsspraket** (Vojmontrilo al la mondlingvo) prezo por ambaŭ 1 sv. kr. La svedaj eldonaĵoj estas akireblaj ĉe Förlagsföreningen Esperanto, Fack 19071, Stockholm 19, Svedlando.

Helsinki. Bildaro faldebla malgrandformate ; 0.16 usona dol.

Taglibro de Kongresano. Turisma paroligilo por nova esperantisto.

Vortlisto (por la Taglibro). Prezo kune : 0.32 usona dolaro.

La tri lastaj ĉe Eldono Vilho Setälä, Onnentie 23, Helsinki-Kä, Finnlando.

Karlovy Vary (Carlsbad) Ĉeĥoslovakujo. Ilustrita faldprospekto, ricevebla ĉe Informa Oficejo de Karlovy Vary, Stará louka č.4.

35-a UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO

PARIS, 5-12 AŬGUSTO 1950

Kongres-Oficejo : 62 AVENUE DE CLICHY, PARIS 18,
FRANCUJO

ALIĜILO

Mi aliĝas al la 35-a Universala Kongreso de Esperanto kaj
kunsendas

Familia nomo (1). S-ro, S-ino, F-ino.....

Personaj antaŭnomoj (1).....

Profesio (2)

Nacieco (2).....

Strato kaj n-ro (1).....

Urbo kaj provinco (1).....

Lando (2).....

Dato..... Subskribo.....

(1) *En nacia lingvo.*

(2) *En Esperanto.*

Nomo de edzino aŭ edzo.....

Vegetarano (jes aŭ ne).....

Mi interesigas pri.....(ekz. scienco,
beletro, arto, ŝakludo, sporto, k.t.p.)

INFORMOJ

Skribu klare, prefere per
skribmaŝino aŭ presliteroj.

Tuj post ricevo de la
kotizo kaj aliĝilo oni sendos
la definitivan karton al la
kongresano. En konvena
tempo ĉiu kongresano
ricevos mendilojn por
loĝejo, ekskursoj, k.t.p.

Glumarkoj. La L.K.K.
decidis ne presigi
glumarkojn.

Blinduloj. Laŭ la
kongresregularo blindulo
kaj lia gvidanto ricevos
senpagan kongreskarton ĝis
la fino de marto 1950. Post
tiu dato ili devos pagi
kongreskotizon po duono
de la ordinara tarifo. La
aliĝilo de blindulo **devas** esti
subskribita de blindula
organizaĵo oficiale registrita,
aŭ de okulkuracisto. Tiuj
aliĝiloj **devas** alveni al la
kongresa oficejo pere de
esperantista landa asocio.

Donacoj por la kongresa
kaso aŭ blindula kaso estos
bonvenaj.

**Ordinarajn aliĝilojn kaj
pagojn** akceptos ankaŭ
UEA en Rickmansworth,
Anglujo.

KONGRESO-KOTIZOJ

	ĝis 31-12-49	ĝis 31-3-50	poste
Kongresano	30 ŝil. (1500 fr.)	36 ŝil. (1800 fr.)	40 ŝil. (2000 fr.)
Edzo aŭ edzino de kongresano ..	15 ŝil. (750 fr.)	18 ŝil. (900 fr.)	20 ŝil. (1000 fr.)
Junul(in)o, ne pli ol 20-jara ..	6 ŝil. (300 fr.)	8 ŝil. (400 fr.)	10 ŝil. (500 fr.)

Aliĝilo sen pago estas senutila.

KATALUNA ANTOLOGIO

kompilita de

JAUME GRAU CASAS

Ĉi tiu bele bindita volumo kun 400 paĝoj da poezio, popolanto kaj mirinda prozo malfermas por la mondo la pordojn al la alta kulturo kaj antikva tradicio de malgranda sed riĉe dotita popolo.

Kiam KATALUNA ANTOLOGIO aperis en 1927 la tuta literaturamanta publiko Esperantista ĝin salutis kiel modelon. Arango, prezento kaj prestekniko staras ekster kritiko. Ĉi tiu unika verko devas nepre trovi lokon sur viaj librobretoj.

Prezo 12 ŝil. 6 pencoj. Aŭfranko 9 p.



Mendu ĉe

UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO

Heronsgate, Rickmansworth, Herts., Anglujo

ALEKSIS KIVI

SEP FRATOJ

Klasika verko el la fora nordlando.

Ekkonu la animon de la finna popolo per ĉi tiu bela traduko en vigla, kolorplena lingvo.

Romano kun la tuta ĉarmo de popolanto.

360 paĝoj.

Prezo : bindita 16 ŝil. 6p., broŝ. 13 ŝil., aŭfranko 6p.

Eldonita de

ELDONO VILHO SETÄLÄ, HELSINKI.

Mendu ĉe

UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO

Heronsgate, Rickmansworth, Herts., Anglujo